

Martin Strid



**BALADOJN
DANCU
FEROE**

Enhavtabelo – kajeroj:

Enkonduko kaj ĝis 149 paŝoj – 32 baladoj

Antaŭparolo:	5	& Ŝiritaj strofoj:	32
Kial baladojn:	6	& Testamento de l' etulino:	33
Kiel danci:	9	& La rano kaj la bovo:	34
La teno en la ĉeno	10	& La mensogema paŝtisto:	35
La paŝoj kaj ĉenaj "maŝoj"	13	& La juĝo de la simio:.....	36
Kiel estri:	16	& La putoro kaj la kokinoj:	37
Kiel regi:	17	& Bonkora homo:.....	38
Kiel instrui:	18	& Fervoraj laboristoj:	39
Kiel parkerigi:.....	19	& Ĝirafo kaj elefanto:	40
Kion kanti:	20	& Nenecea konsilo:	41
& La malsana korvo:	21	& Al Moscheles:.....	42
& Lokomotivo kaj sandalo:	22	& El sama buŝo:	43
& Esperantujo:.....	23	& En songo:.....	44
& Korniko kaj ĉasisto:.....	24	& Histrikaj piko:	45
& Pri nia kor'....:	25	& Kien vi rajdas?:	46
& Birdo kaj aeroplano:	26	& Kurioza kulto:.....	47
& Cimo:	27	& Moviĝemo:	48
& Gazelo kaj elefanto:.....	28	& Ne fariĝi, nur esti:	49
& Hundo kaj kato:	29	& Radioaparato:	50
& Kankro kaj serpento:	30	& Rifuzo de Ezopo submetiĝi al Lidia reĝo Krezo:	51
& Leonfelo:.....	31	& Sincere:.....	52

Ceteraj kajeroj

150–199 paŝoj

200–249 paŝoj

250–299 paŝoj

300–349 paŝoj

350–399 paŝoj

400–449 paŝoj

450–499 paŝoj

500–599 paŝoj

600–699 paŝoj

700–999 paŝoj

1000–1599 paŝoj

1600–1999 paŝoj

2000–2599 paŝoj

2600–2999 paŝoj

3000–5999 paŝoj

6000–7999 paŝoj

8000–9999 paŝoj

10 000–49 999 paŝoj

& Kavaliro en tigra felo

& Sinjoro Tadeo

Kiel plu

'&5. Kiajn baladojn

'&6. Kion kompreni

Feroaj baladestroj rakontas

& Kiel parkerigi

& Kiel regi

& Kiel evolui

Bona aŭ malbona danco

'&7. Kiel verki

'&8. Kiel tonsilabi

'&6.da. Andrea Opielka

Registroj

'&9. Registroj

Tekstoj en alfabetaj vicordoj

Melodioj en tonsilabaj vicordoj

Nomoj en alfabetaj vicordoj

Baladoj en vicordoj laŭ ritmo

Baladoj en vicordoj laŭ deveno

Baladoj en vicordoj laŭ longo

Baladoj en alfabetaj vicordoj

Antaŭparolo:

En jaro 2014 kvin tutajn malnovajn feroajn baladojn mi tradukis en esperanton.

En la traduklaboro naskiĝis la penso krei novajn baladojn, heroajn rakontojn el la historio de la esperantomovado. Valdemara balado estas la unua tia.

En ĉapitroj dua (Kiel danci) kaj tria (Kiel estri) mi ĉerpas precipe el notoj de Andrea Opielka por prelego kiun ŝi faris en konferenco pri baladoj en Toreshaveno, ĉefurbo de Feroaj Insuloj, en julio 2015. Mi tre dankas pro tiuj tre valoraj notoj kiujn al mi ŝi sendis post sia prelego. Ilia tuto estas tradukita en ĉapitro kvina (Kion kompreni).

Mi dankas ankaŭ al Edit Bugge de (Norskt Visearkiv?) kiu dividis kun mi iom el siaj kompreno kaj spertoj pri balada takto kaj melodiuzo en ĉendanco.

Krome Jörgen Backelin el Stokholmo donis valorajn por verkado konsilojn pri enhavo de baladoj.

Dankon ankaŭ al tiuj espoj kiuj donis permeson pri siaj poemoj aŭ tradukoj kaj al tiuj kiuj helpis pri kopirajtoj al verkoj de forpasintaj aŭtoroj. Inter tiuj espoj estas Mikaelo Bronŝtejn, Cezar (Hans-Georg Kaiser), Nana Hizambareli, Sten Johansson, Valentin Melnikov, László Szilvasi, *Vladimir Türk* kaj aliaj.

Bonan ĝuon!

Martin Strid

Borlänge, Svedujo, 2016

Kial baladojn:

Ĉu tradicio el pratempo, kiu travivis en angulo periferia de Eŭropo, povos fariĝi parto kaj eĉ grava riĉaĵo de nova kaj tutmonda kulturo?

Ferooj estas insularo en Atlantika Maro, inter Islando, Norvegujo kaj Skotlando. Tie vivas kelkdek mil feroanoj, kies lingvo estas dialekto de la pra-norvega kaj kies reĝo jam kvincent jarojn estas tiu de Danujo.

En Feroaj Insuloj oni dancas baladojn multajn, longajn, kelkajn tre malnovajn pri herooj en pratempo. La balada kulturo kontribuis al tio ke la feroa lingvo daŭre kaj vigle vivas malgraŭ eksteraj influoj.

La etoso de bona balado povas fari fortan impreson. Mi parolis kun pluraj homoj kiuj unufoje (unu horon) dum infaneco lernis feroan dancon kaj memoras tion tutvive. Ekzemple finnlandano responde al mia blogero pri "Balada somero" diris ke li ankoraŭ memoras kiam li, junulo, antaŭ kvindek jaroj unufoje dancis feroan ĉendancon. Kaj li ne estas sola. Aliaj simile komentis, ekzemple: "Jes, mi memoras tiun dancon ĉar kiam mi estis infano unufoje feroano venis al nia lernejo kaj instruis ĝin al ni."

Kolego rakontis: "Ni iris per ŝipo de norvega haveno Bergen al Islando, pasante per Ferooj. Estis iom blova vetero, sed sufiĉe bone iris, ne tro grandaj estis la ondoj. Ne estis multo por fari en la ŝipo, do iom enue dum tiuj kelkaj tagoj. Inter ni estis ankaŭ feroanoj, irantaj hejmen. Mi unue ne komprenis kion ili faras. Sed ili ĉendancis. Dum la tuta vojaĝo ili ĉendancis, ĝis ni alvenis al Tórshavn. Iuj el ili foje iris dormi ankaŭ, sed la danco ne finiĝis."

Utilo

Por Esperanto, balado povas plenumi plurajn funkciojn samtempe:

♥ Ĝi povas kontribui al agrable intensiva etoso de homa kunesto dum kaj lokaj kaj internaciaj kunvenoj, kongresoj kaj junularaj tendaroj en Esperantujo. Ĉendanco balada estas bonega kombino de kuneco, kantado kaj ritma moviĝo. Ĝi donas senton de komuna ĝojo.

♥ Ĝi povas esti bona ekzerco lingva por komencantoj aŭ tiuj, kiuj malofte havas okazon paroli esperanton en sia proksima ĉirkaŭaĵo. Ripetante baladan tekston oni samtempe ekzercas kaj elparolon kaj vortaron kaj gramatikon.

♥ Trie, verece verkita nova balado povas esti bona historia instruo al parolantoj, kiuj ofte havas maltaŭgajn sciojn pri la historio de esperanto kaj pri la herooj de nia movado.

Avantaĝoj

Kial ĝuste ĉi speco de danco estas tiom bona ĝuste por esperanto?

- La dancopaŝoj estas facilaj, do lerneblaj por homoj el diversaj kulturoj. La danco tamen ne fariĝas enua, pro la kantado kaj pro la "malebena" takto (vidu sube).
- La ĉeno ne estas pariga kaj sendependas je sekso, aĝo kaj aliaj apartaĵoj. Oni nek devas esti sportulo por danci ĝin. Tenante unu la alian per manoj, oni estas simple amikoj kiuj baladas kune.
- Lerni kaj parkerigi baladan tekston estas bona helpilo por lerni kaj memori la lingvon. Tio estas interesa ankaŭ por lingvokurso aŭ -ekzameno.
- Ne necesas ke baladestro kapablu bele kanti. Sufiĉas laŭte kaj ritme paroli, tiel ke ĉiuj aŭdu la vortojn. Baladon oni ne vere kantu, sed recitu, tio estas "dirkantu" aŭ "kantvoku".
- Oni ne bezonas ilojn. Sufiĉas ke estu dancemaj homoj kaj loko kun taŭga planko.
- Dum la danco, eĉ en longa ĉeno, oni renkontas vidalvide la aliajn dancantojn en vico, unun post alia. Tio estas taŭga ekzemple por interkona vespero. (Vidu Interkonan baladon!)

Kiu ajn parkerigas baladon, aŭ eĉ nur parton de longa balado, tiu povos mem konduki ĉendancan en kunveno.

Vizio

Mi havas revon.

En mia revo ĉiu dua aŭ tria espo* parkerigas baladon, longan aŭ mallongan, kaj kapablas konduki ĝin ĉendance. Iuj parkerigas plurajn baladojn. Tiaj baladaj ĉendancoj fariĝos tipa specialaĵo de espaj kunvenoj ĝenerale, kio allogas ĉiam pli da homoj al la movado kaj fortigas ĝian senton de kunesto kaj kunfarado.

La verkado de baladoj fariĝas grava flanko de la literaturo kaj poezio de esperanto. La baladoj temas pri ekzisto ĝenerale, movada vivo, historio kaj diversaj aventuroj. Per la baladaj rakontoj homoj komprenas la mondon iom pli bone, inspiriĝas al aktualaj defioj kaj ĝojas kaj ridas kune.

Esperantistojn oni rimarkas per tio, ke "ah, estas tiuj kiuj ĉendancas baladojn".

– "Ankaŭ mi volas tion! Ĝi aspektas tiel mojose."

– "Ĉu?"

– "Jes!"


– "Do lernu esperanton."

Kajoftiĝas la kutimo ke kulmino de ekzameno en esperantokurso konsistas el tio ke ĉiu lernanto mem elektas, parkerigas kaj estras en komuna ĉendanco baladon.

Tiel eĉ timiduloj kuraĝiĝas por havi fortan voĉon kaj eldiri ne nur poemon sed ankaŭ sian opinion, eĉ pri lingvaj kaj aliaj homaj aferoj kaj tiel plu, eĉ inter fremduloj.

Kiel danci:

Balado estas rakonto kiun oni dancas. Ĉiuj dancantoj kantas ĝin. Per tio oni "revivas" la rakonton. Ĉendanca balado estas iom teatro: Ni donas al ĝiaj personoj niajn voĉojn por ilia rakonto. La baladestro estas la ĉefaktoro. Ĉiuj aŭskultu kaj empatie partoprenu la dramon.



"Feroan dancon en Viðareiði" pentris Emil Krause (1904) kaj poŝtmarkon gravuris Czeslaw Slania (2003).

Ĉendance oni ne uzas muzikilojn. Ĝia ununura instrumento estas la homa korpo: niaj kantaj voĉoj, paŝaj piedoj, tenaj manoj, atentaj kapoj kaj ritmaj movoj.

Oni nek uzu elektran mikrofonon, laŭtparolilon aŭ simile. Ĉendanco balada estas tuja kaj senpera rakonto.

Dum la daŭro de la balado, homoj povas eniri la dancon kaj eliri el ĝi. La kanto povas efiki preskaŭ medite, kvazaŭ oni falas en trancon.

La teno en la ĉeno


Tiel oni faras baladodancan ĉenon [Kv]: Staru en vico unu apud la alia. Per via dekstra mano tenu de supre la duan ĝis kvinan fingrojn de la dekstra najbaro. Ties polekso restu sur la bazo de via polekso. Per via maldekstra mano tenu la dekstran polekson de la maldekstra najbaro, kun via brako sub ties brako. Paŝu stabile kun elasta ritmo en gamboj kaj brakoj.


Ĉi tiu teno permesas ke la ĉeno fleksiĝu al ambaŭ direktoj, eĉ per akraj kurboj.



Elirante el ĉeno kiu ankoraŭ dancas, oni ne rompu la ĉenon. Por tion eviti, oni kunmetas siajn manojn tiel ke oniaj dekstra kaj maldekstra najbaroj kaptas la manojn unu de la alia.

Enironte en dancan ĉenon, oni serĉas lokon inter du homoj dancantoj kiuj bonvole lasas ke oni envenu tie. Neniam eniru apud la baladestro, ĉar tiam vi riskas eniri inter tiu kaj ties helpanto-apoganto kaj per tio eĉ ĝeni la tutan dancoĉenon.





La paŝoj kaj ĉenaj "maŝoj"

Se oni komparas la melodion kun la danco, kiu havas ses paŝojn en ĉiu turno, oni ofte vidas ke ili ne divideblas ebene. Certa loko en la strofo – certa vorto en la rekantaĵo – ne paŝiĝos per la sama piedo en du strofoj sinsekvaj kaj nur ĉiun sesan strofon je la sama paŝo en la danco.

Ĉar – en multaj feroaj baladoj – la nombro da taktobatoj por strofo estas 29. Tio estas prima nombro. Aliaj baladoj havas 31, 37, 41 aŭ 23 batojn por strofo – ankaŭ primoj.

Por komencanto tio povas igi la dancon pli malfacila por lerni, sed en la longa daŭro ĝi faras la dancon pli interesa por la dancantoj.

Kiel klariĝas en ĉapitro "Kiel estri", la prima takto utilas ankaŭ por pli bone ebligi al baladestro dramigi la rakonton.

Inter la ĉi libre kolektitaj baladoj ne ĉiuj estas primtaktaj aŭ eĉ malparaj. Sed multaj estas, ĉar tio donas pli bonan dancon kaj pli vivan aŭskulton.

Cetere, la dancopaŝoj estas simplaj. Ili taktsilabeblas tiel:

#: <Dance>

(Kv: pi Pi pi Pi Pe pe)×


kie la rimarko <Dance> indikas taktsilabojn por danco, la ilumo [Kv] signifas baladdancan prenon en ĉena ringo – vidu supre – kaj la taktsilabo [pi] estas unu paŝo maldekstren, [pe] unu paŝo dekstren, supra tonciklo [pe, pi] signifas maldekstran piedon, meza tonciklo [Pe, Pi] signifas dekstran piedon kaj la kruco × signifas ke la tuta parentezo () ripetiĝas. Ĉiuj takteroj (taktsilabaj "vortoj") samlonge daŭras.

Stígingarstev (Vanligur dansur) – paŝa ĉendanco,


Trokingarstev – treta ĉendanco

Bandadansur – rubanda ĉendanco

La distanco inter vidalvidaj dancantoj en la dancoĉeno ne estu granda, sed permesu proksiman okule kontakton. Jen dancoĉeno da kvin dancantoj, vidataj de supre:



Kaj jen ekzemplo de dudek dancantoj. La sagoj en la ĉeno montras irdirekton:



Kiel estri:



"Ĉendancon" skulptis Janus Kamban (1939) kaj ekspozicias Artomuzeo de Tórshavn, Feroaj Insuloj.

Ĉendanco balada bezonas nek muzikilojn nek elektrajn sonhelpilojn. Nek estas bezonataj – aŭ eĉ dezirindaj – spektantoj ekster la ĉeno. Sed nepre ĝi bezonas baladestron. Por ĉiu balado estas bezonata minimume unu homo kiu kapablas estri ĝin. Jen kion sciu tiu homo:

Kiel regi:

Baladon estrante oni sciuj ĝin parkere. De ĉiu ĝia strofo oni regu la version, tiel ke oni ne stumblu pri la ritmo, eĉ dum varias la nombro da silaboj de unu strofo al alia.

Onia voĉo estu sufiĉe laŭta kaj klara por ke ĉiuj aŭdu la vortojn de la rakonto de la balado. Gravas kapablo kaj teĥniko spiri. Ne gravas beleco de kanta voĉo. Eĉ ne tre gravas la melodio: Oni povas tute bone eldiri tutan baladon sen melodio, nur parolante (dirkantante) en klara ritmo. Oni povas ankaŭ nur foje "tuŝeti" la melodion dum sia kantvokado. Kaj la ritmo gravas!

La ĉendancon direktas la baladestro. Tiu regu ĝian rapidon, tonalon, intensivon, etoson, dramigon kaj sinsekvon de strofoj. Nepre la unua(j)n vorton de ĉiu strofo diru nur la baladestro, eĉ se ankaŭ aliaj scias la baladon parkere.

Por helpo memori vicordon de strofoj kaj apogo sufiĉe laŭte kanti ilin, la baladestro povas havi apud si kunulon kiu ankaŭ bone scias la baladon.

Tradicie, lerta baladestro aldonas aŭ forprenas strofojn dependaŭ etoso. Lerta baladestro povas ankaŭ aldoni "krompaŝojn" ekstertekstajn por ke en iu sekva strofo certa forta paŝo falu ĝuste sur certa drama vorto, ekzemple ke stamfa treto dekstren per dekstra piedo marku la mortigan frapon kontraŭ iu persono en la rakonto. Jen unu grava avantaĝo de malpara aŭ primnombra takto.

Alia avantaĝo estas jena: Foje povas tamen okazi ke baladestro stumblas pri la teksto. Kiam tio okazas, li povas tuj korekti sin kaj daŭrigi, sen atendi "silentajn paŝojn" ĝis la paŝoj denove kongruas kun la strofoj – ĉar ili ĉiam, ĉiel kaj ĉiavice kongruas!

Kiel instrui:

Instruante ĉendancon al novuloj, rakontu la ideon de ĉendanco: Ĝojon kaj ĝuon, krome ĝi konigas interesan historion kaj fortigas nian lingvon.

Montru kiel teni la manojn. La ĉeno povu faldiĝi tien kaj reen.

Oni povas kaj eniri en la ĉenon kaj eliri el ĝi dum la danco daŭras. Nur zorgu ke oni ne rompu la ĉenon!

Rakontu pri kio temas la balado kaj klarigu gravajn detalojn.

Montru kiel oni paŝas. Rimarkigu ke pro prima aŭ malpara takto en multaj baladoj maleblas kongruo inter paŝoj kaj strofoj. La paŝado fariĝu aŭtomata kaj devas esti sendependa de la divido en strofojn.

Ne lasu tro grandan spacon inter ni, "en la cirklo", ĉar ni volas esti proksimaj unuj al la aliaj kaj senti kunecon.

Atentigu ke la kerno de la balado estas la teksto, la rakonto mem. Aŭskultu, rigardu unu la aliajn, ne siajn piedojn, kaj atentigu kiel dramigas la baladestro. Memoru ke ne temas pri belkanto, sed balado, do diro, oratorado, en kiu oni elvokas fabelajn voĉojn rakonti sian historion.

Diru la rekantaĵon. Poste kantu ĝin. Ripetu ĝis ĉiuj scias ĝin kaj kunkantas, paŝante.

Klarigu ke la baladestro bezonas la rekantadon farab la aliaj dancantoj por povi mem rememori la sekvan strofon, foje ripozigi per silento sian voĉon kaj eble eĉ trinki akvon se la balado estas tre longa.

Ĉendancu!

Kiel parkerigi:

Jen unu proponata metodo parkerigi baladon:

Elektinte "vian" baladon, lernu unue ĝian melodion (se vi intencas uzi melodion – ja eblas ankaŭ nur dir-voki). Se ĝi havas plurajn melodiojn, elektu vian preferan. Legante la tekston kantu (aŭ dirvoku) la tutan baladon dek- aŭ dudekfoje aŭ eĉ pli, senhalte ripetante ĝin ĝis vi rimarkas ke la strofoj komencas fiksiĝi en via memoro.

Se la balado estas tro longa, dispartigu ĝin kaj lernu la strofojn eble dek- aŭ dudekfoje.

Kiam vi kredas ke vi povas pli-malpli memori la tutan baladon, kantu ĝin elmemore, sen dume vidi la tekston. Ripetu tion ĝis la strofoj venas en bona fluo. Se vi stumblas je iu loko en la teksto, riripetu ne nur tiun strofon sed ek de la strofo antaŭ ĝi, ĉar tiel via subkonscio ordigos la vortojn en bona vico. La sinsekvo de vortoj kaj strofoj kunligiĝu kaj aŭtomatiĝu en via kapo.

Ĉi tiun senlegan ekzercon vi povas fari multokaze, ekzemple dum vi promenas, biciklas, stiras veturilon, faras iun alian fizikan laboron, duŝas aŭ banas vin, ripozas hejme, pretiĝas por dormi aŭ jam enlitiĝis. Vi ja ne plu bezonas eĉ lumon por legi la tekston.

Ankaŭ kiam vi jam regas la baladon, ripetu ĝin foje. Ĝi bone "sidas" en via memoro se vi povas korekte kanti ĝin kvankam vi dume pensas pri aliaj aferoj.

Estas grave ke oni ekzercu ankaŭ moviĝante, dancante la paŝojn kaj balancante en ritmo la brakojn.

Se vi lernas nur parton de longa kaj multparta balado, tiam lernu ankaŭ la lastajn strofojn de la antaŭa parto kaj la unuajn de la sekva parto, por ke la sinsekvo de la balado estu ĝusta kun pluraj baladestroj kiuj kunlaborante estras po parto.

Kion kanti:

Jen sekvas kvarcento da kolektitaj baladoj en vicordo laŭ daŭro (ĝisfina nombro da paŝoj). (Per a kaj b numeriĝas traduko duobla de sama strofo el alilingva fonto).

Trezorkeston

Mi kunmetis kelkajn baladojn malnovajn tradukitajn el aliaj lingvoj, kelkajn novajn originale verkitajn en esperanto kaj ĉiujn espajn poemojn kiujn mi baladigis.

Espereble ĉiu trovos almenaŭ unu baladon kiun li aŭ ŝi ŝatas mem.

Elektu vian propran baladon!

Legu la rakontojn, aŭskultu la melodiojn, provu kanti strofojn, taksu, forĵetu tion kion vi ne ŝatas, ĝuu la pli bonajn baladojn kaj parkerigu tion kion vi preferas mem.

Ekzerce kantu kaj paŝu la baladon ĝis vi sufiĉe certas pri ĝi.

Kiam vi tiom certas pri la balado, provu estri ĝin en ĉendanco kun aliaj homoj.

Jen vi fariĝanta baladestro!

& La malsana korvo:

< Rekante 9 el 17 batoj por strofo, entute 85 paŝoj dum 1 minuto. Verkis Kálmán Kalocsay (Ezopa Saĝo, 1956). Baladigis Martin Strid (2015) per sama melodio kiel por Ora Koko kaj alia rekantaĵo.>

(#Melodio:

<:17> (/dore mifa soso somi; rere mimi mire dodo;
(#Rekantaĵe: dore mifa soso mi; rere mimi rere doTi La)
)×5)+

(&Strofoj:

'1 Korvo de malsan' suferis, ;
korvpatrino malesperis,

(×:; **Gaje dancu en la rond' ;
kaj ni kantu pri bestara
mond'.**)

'2 dikajn larmojn dense ploris,
; ŝia id' al ŝi parolis:

'3 "Panjo, larmojn plu ne
verŝu, ; ĉe la dioj helpon
serĉu!"

'4 "Kiu dio, filo kara, ; min
aŭskultos, helpkrianton?

'5 Ja de kies ŝton' altara ; vi ne
ŝtelis jam viandon?"

& Lokomotivo kaj sandalo:

< Rekante 9 el 17 batoj por strofo, entute 102 paŝoj dum 2 minutoj. Verkis Ŝtefo Urban (Nova Ezopo, La Laguna de Tenerife 1961). Baladigis Martin Strid (2017) per novaj melodio kaj rekantaĵo.>

(#Melodio:

<:17> (/doododo mimi; soosofa mimi; faafami rere; soosofa mimi;

(#Rekantaĵe: doododo mimi; soosofa mimi; faafare Tire; mire do o)

)×6)+

(&Strofoj:

'1 Lokomotivo ; kaj la sandalo ; havis proceson: ; granda skandalo!

(×:; **Tretu, ripetu ; kion mi kantas ; tuj en la sekva bela strof'**.)

'2 La monda globo ; kies propraĵo ; (laŭ la merito, ; ne - laŭ la aĝo)?

'3 La juĝa korto ; juste decidu ; nun, kiu pravas. ; Kaj vi ne ridu!

'4 Grave cerbumas ; la advokatoj ; pri la demando ; jam dum monatoj:

'5 Lokomotivo ; kun fera zono ; mondon katenas ; ĝis Vaŝingtono.

'6 Sed sub sandaloj ; ĝis la polusoj ; la mondon havas - ; angloj kaj rusoj!

& Esperantujo:

< Rekante 9 el 19 batoj por strofo, entute 114 paŝoj dum 2 minutoj. Verkis Marie Hankel (1907; Sableroj, Leipzig 1911). Baladigis Martin Strid (2017) per novaj melodio kaj rekantaĵo.>

(#Melodio:

<:19> (/so faamimi reedodo reemimi reere;re lala tiilala sofa mimi;

(#Rekantaĵe: so faafafa mire dore mimi; lala tila sofa fami i)

)×6)+

(&Strofoj:

,&1:

'1 Mi ion deziras, mi havas demandon, ; Mi serĉas ian tre belan landon!

(×:; **Ho, iru atente, paŝu milde ; landon mi imagas bilde.**)

'2 Landon kun por mi florantaj floroj, ; Kie varmege batas la koroj.

,&2:

'3 Ho lando belega, ĉu vi ekzistas? ; Sur nia tero, kie vi troviĝas?

'4 Lando, varmege deziregata, ; Kie vi estas, ho mia amata?

,&3:

'5 Al via demando mi scias respondon: ; Amikaj koroj plenigas la mondon,

'6 Lando floranta jam estas trovata, ; ESPERANTUJO ĝi estas nomata.)

& Korniko kaj ĉasisto:

< Ripete 12 sed rekante 7 el 19 batoj por strofo, entute 114 paŝoj dum 2 minutoj. Norda Kantaro #144. El sveda tradukis Kukoletto (1995). Klarigo (*): '2 Tejn = tien.>

(#Melodio:

<2:19> <[Vo] = diro sen melodio> (

/so mido miso solfa re; SooSoSo SoSo SooSoSo doorere mifa so
o; so mido miso solfa re Voh h

)×6)+

(&Strofoj:

'1 /En arbo sidis ko2rnik- ;
kuleri vimpam pamperi puleri
vimpam pam ; En arbo sidis
ko2rnik-et'.

'2 (: Ĉasisto brava ve2nis)

(×:; **kule rivimpam pampe ri
pule rivimpam pam ;**)

(,: Ĉasisto brava ve2nis) tejn*.

'3 Li pafis kornike2ton en
arb'.

'4 Li fritis kornike2ton en
gras'.

'5 Li manĝis kornike2ton
for.

'6 Kaj jen la kornike2ta
fin'.)

& Pri nia kor'....:

< Rekante 11 el 19 batoj por strofo, entute 114 paŝoj dum 2 minutoj. Poemon verkab Kálmán Kalocsay (Mondo kaj koro, 1921) baladigis Martin Strid (2015) komponub nova melodio kaj verkub nova rekantaĵo.>

(#Melodio:

<:19> (

o;do /miimimi remi dodo o;mi soso fa;mi miimimi remi soso o;

(#Rekantaĵe: soososo fafa mi;mi remi dodo; miimimi rere do)

)×6)+

(&Strofoj:

'1 Ni /estu fieraj, fratoj ; Pri
nia kor', ; Pri ĝiaj doloraj
batoj!

(×: **Tenu la ĉenon jen ; Ĝi
estu forta ; Tenu la ĉenon
jen.**)

'2 Ĉar estas la bat' dolora ; En
nia kor' ; Pro tuta la mond'
senkora.

'3 Nin mok' kaj malam'
rigardas; Sed nia kor' ; Nur
amon rebrilas, ardas.

'4 En vintro de l' tempo nuna ;
Jen nia kor'! ; Ĝi estas la brilo
suna.

'5 Frostiĝas nun sent' kaj
larmo... ; Sun': nia kor' ;
Vanluktas kun la malvarmo.

.....

'6 Sed venos, ho venos tempo
; Por nia kor'! ; Ni fidu je la
printempo!

& Birdo kaj aeroplano:

< Rekante 13 el 23 batoj por strofo, entute 115 paŝoj dum 2 minutoj. Verkis Ŝtefo Urban (Nova Ezopo, La Laguna de Tenerife 1961) kun priskribo "Kantaĵo". Baladigis Martin Strid (2017) per sama melodio kiel por "Morta princino kaj sep herooj" kaj rekantaĵo el la verko de Urban sesobligita.>

(#Melodio:

(#Nova: <:23> /so so soso fami soso; mimi mi mi redo mimi;

(#Rekantaĵo: soso soso laso fami; remi fafa faso fami; redo mimi rere do do))×5)+

(&Strofoj:

'1 Flugis birdo ; en spiralo ; de la monto ; al la valo

(×:; (ku-ku, ku-ku!)×6)

'2 Ĝin renkontis ; la helico, ; tre moderna - ; lasta vico;

'3 Via flugo, ; kara ido, ; tre malfruas ; je rapido;

'4 La kukolo ; klakis beke ; kaj respondis ; iom seke:

'5 Birdoj flugas ; kun la kanto. ; Aeroplano? ; Diletanto!

& Cimo:

< Rekante 13 el 23 batoj por strofo, entute 115 paŝoj dum 2 minutoj. Verkis Ŝtefo Urban (Nova Ezopo, La Laguna de Tenerife 1961). Baladigis Martin Strid (2017) per samaj melodio kaj rekantaĵo kiel por "Ĝirafoj kaj elefanto".>

(#Melodio:

<:23> (o;So /dodo dodo SoSo SooSo;So LaSo LaSo LaTi do So o;So dodo dodo SoSo SooSo;So LaSo LaSo LaTi do mire do Ti do)×5)+

(&Strofoj:

'1 Akuzis iuj ; paraziton, ; ke ĝi postkuras ; la profiton.

(×:; **La tera globo turnas sin ; kaj ni nin turnas en festen' en la ĉeno jen.)**

'2 Ĝis nekredablo ; kun kruelo ; ĉantaĝe gajnas ; en bordelo.

'3 Cim' opiniis ; tute prave : ; Jen hipokrito, ; sed negrave!

.....

'4 Mi servas krome ; al moralo, ; eĉ malhelpadas ; al skandalo.

'5 Ĉar nur pro naŭzo ; kontraŭ cimoj - ; sin multaj tenas ; en la limoj!

& Gazelo kaj elefanto:

< Rekante 13 el 23 batoj por strofo, entute 115 paŝoj dum 2 minutoj. Verkis Ŝtefo Urban (Nova Ezopo, La Laguna de Tenerife 1961). Baladigis Martin Strid (2017) per samaj melodio kaj rekantaĵo kiel por "Ĝirafoj kaj elefanto".>

(#Melodio:

<:23> (o;So /dodo dodo SoSo SooSo;So LaSo LaSo LaTi do So o;So dodo dodo SoSo SooSo;So LaSo LaSo LaTi do mire do Ti do)×5)+

(&Strofoj:

'1 GAZEL' kaj dika elefanto ;
disputis pri la eleganto.

(×:; **La tera globo turnas sin
; kaj ni nin turnas en festen'
en la ĉeno jen.)**

'2 L' unua tre emfazis svelton,
; l' alia bonan postamenton.

.....

'3 Talento mia en heredo: ;
GAZEL' naskiĝis por baledo!

.....

'4 Giganto opiniis malon, ;
montris barokan katedralon:

.....

'5 Por arkitekto la modelo ;
nur ELEFANT'; jen, ci
nudelo!

& Hundo kaj kato:

< Rekante 12 el 23 batoj por strofo, entute 115 paŝoj dum 2 minutoj. Verkis Ŝtefo Urban (Nova Ezopo, La Laguna de Tenerife 1961). Baladigis Martin Strid (2017) per novaj melodio kaj rekantaĵo.>

(#Melodio:

<:23> (/dodo dore; mifa soso somi; soso lati sofa; mire mi do;
(#Rekantaĵe: dodo dore mifa soso somi; soso lati sofa mire do do
o;))×5)+

(&Strofoj:

'1 Kato miris ; pri la hundo
foje, ; ke li kontraŭ luno ;
hurlas boje:

(×:; **Ni parolas kaj ne volas
esti ; malamikoj en la festa
ĉeno.**)

'2 Dum vespero, ; aŭdu, je la
naŭa, ; kiel bele sonas ; kant'
miaŭa!

'3 Hund' respondis: ; Mia
serenado ; estas kanto; via ;
nur degrado.

'4 Ĝenerale ; via luno-tosto ;
ne valoras svingon ; per la
vosto!

'5 Nu, videble por la arta
normo - ; iel ne ekzistas
uniformo... ..)

& Kankro kaj serpento:

< Rekante 13 el 23 batoj por strofo, entute 115 paŝoj dum 2 minutoj. Verkis Kálmán Kalocsay (Ezopa Saĝo, 1956). Baladigis Martin Strid (2016) per melodio kaj rekantaĵo novaj.>

(#Melodio:

<:23> (/LaLa dodo TiTi LaSo LaLa; dodo mimi rere dore mimi;
(#Rekantaĵe: mi LaLa do re La So La La; mi LaLa do re e)
)×5)+

(&Strofoj:

'1 Kankro kun serpento vivis
kune. ; Dum la kankro estis tre
bonfida,

(×:; **En sia ŝel' ĝi vivis bone ;
En sia ŝelo.)**

'2 la serpento estis serpentume
; ruza kaj perfida kaj insida.
.....

'3 Nu, la kankro longe ja
toleris, ; sed ĝi fine ege
ekkoleris,

'4 ties kolon per tondil'
disŝiris, ; etendinte ĝin
laŭlonge, diris:

'5 “Jen, vi povus vivi
sendifekta, ; se vi estus ĉiam
tiel rekta.”

& Leonfelo:

< Rekante 12 el 23 batoj por strofo, entute 115 paŝoj dum 2 minutoj. Verkis Kálmán Kalocsay (Ezopa Saĝo, 1956). Baladigis Martin Strid (2015) per novaj melodio kaj rekantaĵo.>

(#Melodio:

<:23> (

/mi mimi soso soso lala soofa;fa mimi mimi rere mimi redo;

(#Rekantaĵe: mi3mi mimi so so; lala sofa mi mi redo Tido La a)

)×5)+

(&Strofoj:

'1 /Leonon la urbloĝantar' de Kyme ; neniam vidis, eĉ de malproksime.

(×:; **Kantu kaj ridetu ; kaj fiere tretu la rakonton jen.**)

'2 Jen, ia besto kun leonharfasko ; (ĉu estis ĝia propra aŭ nur masko?)

'3 aperis sur la strato, hurle muĝis, ; ke terurite ĉiu hom' rifuĝis:

'4 "Leono!". Sed fremdul' el regiono, ; kie konata estas la leono,

'5 ĝin draŝis draste, kaj post la forpelo ; klarigis: "Nur azen' en leonfelo."

& Ŝiritaj strofoj:

< Rekante 9 el 23 batoj por strofo, entute 115 paŝoj dum 2 minutoj. Verkis Kálmán Kalocsay (Mondo kaj koro, 1921). Baladigis Martin Strid (2015) per nova melodio kaj rekantaĵe la titolo de la poemo.>

(#Melodio:

<:23> (

re /rere mifa mire TiTi; fa rere TiTi dore mimi; re mifa mire TiTi;

(#Rekantaĵe: fafa mire TiTi; fafa mire do lTi La a)

)×5)+

(&Strofoj:

'1 Me/moro, mola lito muska!
; Min kial la sopir' embuska ;
Forpelas de vi ĉiam...

(×:; **Jen ŝiritaj strofoj ; Jen ŝiritaj stro2foj.)**

'2 Ĝemspiron ĵetas la sopiro ;
Kaj refalinta ĝemospiro ;
Ekbatas koron ŝtone.

'3 Se brakojn mi al nokt'
etendas, ; Se savan voĉon mi
atendas, ; Neniam venas voko.

.....

'4 La lum' de l' songoj iĝas
blinda, ; La blu' de l' songoj—
paliĝinta ; Malplen' kaj nigro
ĉie.

'5 Kaj mi sveninte, pale kuŝas
; Kaj mian lacan koron tuŝas ;
Per brulostampo la dolor'.)

& Testamento de l' etulino:

< Rekante 15 el 23 batoj por strofo, entute 115 paŝoj dum 2 minutoj. Norda Kantaro #5543. El sveda tradukis Kukoletto (1993 FIORE).>

(#Melodio:

<:23> (

a;La /LaaaLa LaLa Lalmi mi; reedoTi LaSi Mi i;mi miimimi fimi
reldi La; do reldoTiSi La a; La Mi do Ti SiiLaTi La

)×5)+

(&Strofoj:

'1 Vi /kion tie rice2vis ; mia
pruntit-filin'? ; Ŝi faris angilon
pi2pran ; duo2na patrin' ; Aj,
aj, tre doloras al mi.

'2 Al frato kion vi donos

(×:; **mia pruntit-fi/lin'?** ;)

Ambaŭ miajn kestojn

(×:; **duona patrin' ; Aj, aj,
tre doloras al mi.**)

'3 Al franjo kion vi donos
Ĉiujn miajn vestojn

'4 Al patro kion vi donos
Regnon la ĉielan

'5 Al panjo kion vi donos
Inferturmenton

& La rano kaj la bovo:

< Rekante 9 el 17 batoj por strofo, entute 119 paŝoj dum 2 minutoj. Verkis Kálmán Kalocsay (Ezopa Saĝo, 1956). Baladigis Martin Strid (2015) per sama melodio kiel por Ora Koko kaj alia rekantaĵo.>

(#Melodio:

<:17> (

/dore mifa soso somi; rere mimi mire dodo;

(#Rekantaĵe: dore mifa soso mi; rere mimi rere doTi La)

)×7)+

(&Strofoj:

'1 /Sur kamprando rano sidis, ;
grasan bovon ĝi ekvidis.

(×:: **Gaje dancu en la rond' ;
kaj ni kantu pri bestara
mond'.**)

'2 Ties grandon rigardante, ;
ekenviis ĝi, kaj vante

'3 sian haŭton ĝi plenblovis, ;
eĉ pli granda esti provis.

'4 "Ĉu mi dikas pli impone?" ;
La ranidoj diris: "Ho, ne!"

'5 Ĝi pli streĉas sin,
demandas: ; "Jen do, kiu nun
pli grandas?"

'6 "Ankoraŭ ĉiam nur la
bovo!" ; En furioz' laŭ tuta
povo

'7 ĝi blovege streĉe strebis, ;
(kaj ĝi krevis)×

& La mensogema paŝtisto:

< Ripete 12 el 25 batoj por strofo, entute 125 paŝoj dum 2 minutoj. Verkis Kálmán Kalocsay (Ezopa Saĝo, 1956). Baladigis Martin Strid (2015) komponub nova melodio.>

(#Melodio:

<:25> (

o;So /dodo mimi soso fami re re;So dodo mimi soso fami re re;

TiiTiTi rere fafa mire do do; TiiTiTi rere fafa mire do do

)×5)+

(&Strofoj:

'1 (Paŝtisto ŝafojn paŝtis sur herbejo,)× (foje ekkriis li kun granda veo:)×

'2 "La lup', la lup'!" — li kriis malespere. nenion vidis — li mensogis nure.

'3 Plurfoje li danĝeron same signis, la homoj kuris helpi, kaj indignis.

'4 Sed foje, jen, la lupo venis vere. "La lup', la lup'!" — li kriis malespere.

'5 Sed liaj vortoj jam ne trovis kredon. La lupo tiam havis riĉan predon.)

& La juĝo de la simio:

< Rekante 19 el 29 batoj por strofo, entute 135 paŝoj dum 2 minutoj. Verkis Kálmán Kalocsay (Ezopa Saĝo, 1956). Baladigis Martin Strid (2016) per melodio kaj rekantaĵo de & Filino de Torkil.>

(#Melodio:

<1,7:27>

(oso /sodo doododo rere so;so somi; sososo soso fami relmi; fa mimi re do; rere rere rerere soso somi; sososo soso faamimi remi; fa mimi re do)×5)+

(&Strofoj:

'1 Pri /ŝtel' akuzis lupo vulpon, (×: – **ja danci** –) la vulpo negis tiun kulpon. (×: – **Bone min ŝancis, ; jen mi volas plankon antaŭen danci, ; kvankam vi mian vivon minacis, ; bone min ŝancis.**)

'2 Do ili petis la simion eldiri juĝan opinion.

'3 Ĉi tiu diris juĝodone:

“Se mi vin ambaŭ konas bone,

'4 vi, lup', verŝajne repostulas ion senrajte, ĉar senperde;

'5 vi, vulpo, negi ne skrupulas ŝtelon faritan preskaŭ certe.)

& La putoro kaj la kokinoj:

< Rekante 19 el 27 batoj por strofo, entute 135 paŝoj dum 2 minutoj. Verkis Kálmán Kalocsay (Ezopa Saĝo, 1956). Baladigis Martin Strid (2016) per melodio kaj rekantaĵo de Filino de Torkil kaj redakteto je strofoj '2 kaj '3.>

(#Melodio:

<1,7:27>

(oso /sodo dodo rere sooso;so soomi;so soso soso fami remi; fa mimi re do; rere rere rerere soso somi; sososo soso faamimi remi; fa mimi re do)×5)+

(&Strofoj:

'1 Pu/toro aŭdis, ke malsanas
(×: – **ja danci** –) kokinoj, kaj
ĝi ion planas: (×: – **Bone min
ŝancis, ; jen mi volas
plankon antaŭen danci, ;
kvankam vi mian vivon
minacis, ; bone min ŝancis.**)

'2 Alprenas ĝi medikamentojn
..... kaj kuracistajn
instrumentojn,

'3 kaj iras al la stal' kokina
kiel doktoro medicina.

'4 Ĝi antaŭ ties pordo haltas,
..... demandas, kiel ili fartas.
.....

'5 Responde la kokinoj diras:
..... “Tre bone tuj, se vi
foriras.”

& Bonkora homo:

< Rekante 13 el 23 batoj por strofo, entute 138 paŝoj dum 2 minutoj. Verkis Alois Norbert (kaŝnomo de Alois Berndl) (La mondo ridas, Vieno, 1937). Baladigis Martin Strid (2016) per sama melodio kiel por Morta princino kaj sep herooj kaj nova rekantaĵo.>

(#Melodio:

<1,6:23> (

/so so soso fami soso; mimi mi mi redo mimi;

(#Rekantaĵe: soso soso laso fami; remi fafa faso fami; redo mimi rere do do)

)×6)+

(&Strofoj:

'1 /Al dentisto venas viro ; Kaj
li diras kun ekspiro:

(×: **Ĉenon paŝu senŝancele, ;
La piedojn metu bele, ;
Ĉenon paŝu senŝancele.**)

"2 "Estimata ho doktoro, ; Min
turmentas dent-doloro.

'3 Do, narkotu min, sinjor', ;
Kaj la denton prenu for!"

'4 "La doloro tuj ja ĉesos, ;
Sed narkoto ne necesos",

'5 La doktor' konsole diras. ;
"Se la denton mi eltiras,

'6 La koncion perdos vi, ; Sen
ke vin narkotis mi!"

& Fervoraj laboristoj:

< Rekante 13 el 23 batoj por strofo, entute 138 paŝoj dum 2 minutoj. Verkis Alois Norbert (kaŝnomo de Alois Berndl) (La mondo ridas, Vieno, 1937). Baladigis Martin Strid (2016) per samaj melodio kaj rekantaĵo kiel por Bonkora homo.>

(#Melodio:

<1,6:23> (

/so so soso fami soso; mimi mi mi redo mimi;

(#Rekantaĵe: soso soso laso fami; remi fafa faso fami; redo mimi rere do do)

)×6)+

(&Strofoj:

'1 /Diris masonist' Johano ; Al amiko Kolomano:

(×: **Ĉenon paŝu senŝancele, ;
La piedojn metu bele, ;
Ĉenon paŝu senŝancele.)**

'2 "Ĉu vi tie sur la tur' ; Vidas muŝon sur la mur'?"

'3 "Ne", respondis la alia, ;
"Muŝon el distanco tia

'4 Ne mi vidas sur la mur' ; De la urbodoma tur'."

'5 Sen hezit' al Kolomano ; Jen proponis nun Johano:

'6 "Ni do devas fini jam; Estas tro malhele jam!"

& Ĝirafoj kaj elefantoj:

< Rekante 13 el 23 batoj por strofo, entute 138 paŝoj dum 2 minutoj. Verkis Ŝtefo Urban (Nova Ezopo, La Laguna de Tenerife 1961). Baladigis Martin Strid (2017) per novaj melodio kaj rekantaĵo.>

(#Melodio:

<:23> (o;So /dodo dodo SoSo SooSo;So LaSo LaSo LaTi do So o;So dodo dodo SoSo SooSo;So LaSo LaSo LaTi do mire do Ti do)×6)+

(&Strofoj:

'1 Ĝirafoj kaj la elefanto ; sin ŝerce pikas en konstanto.

(×:; **La tera globo turnas sin ; kaj ni nin turnas en festen' en la ĉeno jen.)**

'2 La elefanto diris foje: ; Vi certe brandon glutas ĝoje!

'3 Ĉar ties ege longa kuro ; tra via kolo - 'stas plezuro.

'4 Tre trafa la respondo estis, ; ĝirafoj ŝulda ne postrestis:

'5 Vi ridu je la propra kosto; meditu same pri la rostro.

'6 Viciĝas via naz-kataro ; laŭ grandioz' tuj post la maro!)

& Nenecesa konsilo:

< Rekante 13 el 23 batoj por strofo, entute 138 paŝoj dum 2 minutoj. Verkis Alois Norbert (kaŝnomo de Alois Berndl) (La mondo ridas, Vieno, 1937). Baladigis Martin Strid (2016) per samaj melodio kaj rekantaĵo kiel por Bonkora homo.>

(#Melodio:

<1,6:23> (

/so so soso fami soso; mimi mi mi redo mimi;

(#Rekantaĵe: soso soso laso fami; remi fafa faso fami; redo mimi rere do do)

)×6)+

(&Strofoj:

'1 /Kuracisto dum esploro ;
Diris al la konduktoro:

(×: **Ĉenon paŝu senŝancele, ;
La piedojn metu bele, ;
Ĉenon paŝu senŝancele.)**

'2 "Ne diboĉu, ne ekscesu, ;
Kaj drinkadi do vi ĉesu,

'3 Vivu ĉiam, ho karulo, ; Laŭ
dieta la regulo!"

'4 Diris sed la konduktoro: ;
"Dankon, ho sinjor' doktoro!

.....

'5 La konsilo ne necesas, ; Ĉar
neniam mi ekscesas:

'6 Mi ja drinkas laŭ regulo. ;
Ĉiam estas mi drinkulo!

& Al Moscheles:

< Rekante 15 el 29 batoj por strofo, entute 145 paŝoj dum 2 minutoj. Verkis L. L. Zamenhof (, &1 "Al mia amata amiko Felix Moscheles por la 8a de Februaro 1913"; , &2 Telegramo al Moscheles, 1913). Baladigis Martin Strid (2017) per feroaj melodio de Drako Longa kaj rekantaĵo de Davida balado.>

(#Melodio:

(# Ormurin Langi: /mi mire reedodo doodo;do dodo doodore mi;
mi mire mire miimi;mi sososo fami mi;

(#Rekantaĵe: redo re rere mire do rere re; rere mire doTi LaSo So
LaTi do o)

)×5)+

(&Strofoj:

,&1:

'1 /Hodiaŭ, kiam vi festas, ;
Mi staras ankaŭ ĉe Vi: ; Se
korpe mi forestas, ; Spirite mi
estas ĉi.

(×:Bruas danco en halo,
dancu en ĉen'! ; Ĝojaj paŝas
ni en esperanto-kunven'.)

'2 El Via serena vizaĝo ;
Radias lumo ĉarma, ; Tiel
plena de sprito kaj saĝo, ;
Tamen tiel kvieta kaj varma...

....

'3 En Via voĉo sincera, ; La
vira, sed gaja kaj mola, ;
Aŭdiĝas paco la vera, ;
Sentiĝas amo konsola.

'4 Mi premas Vian manon ;
Kun mora simpati' ; Kaj
longan vivon kaj sanon ; Mi
sincere deziras al Vi.

,&2:

'5 Konservu plenege, amiko
plej kara, ; Vigecon kaj sanon
ĝis festo centjara.)

& El sama buŝo:

< Rekante 15 el 29 batoj por strofo, entute 145 paŝoj dum 2 minutoj. Verkis Kálmán Kalocsay (Ezopa Saĝo, 1956). Baladigis Martin Strid (2015) per melodio de Drako Longa kaj rekantaĵo de Davida balado.>

(#Melodio:

<:29> (o;mi /mimi mire redo doodo;do dodo dore miimi;mi mimi mire mire miimi;mi soso fami mimi;

(#Rekantaĵe: redo re rere mire do rere re; rere mire doTi LaSo So LaTi do)

)×5)+

(&Strofoj:

'1 La /faŭn', la homo,
vojkompanoj, ; en vintro vage
iris. ; Ekfrostis al la hom' la
manoj, ; kaj li en ilin spiris.

(×: **Bruas dancu en halo,
dancu en ĉen'!** ; **Ĝojaj paŝas
ni en esperanto-kunven'.**)

'2 "Sed kial tio, homamiko?"
— ; la faŭno nun scivolis. ;
"Nu, kial? Do por revarmigo"
— ; la homo reparolis.

'3 Ili ripozis en kampdomo, ;
ricevis eĉ manĝadon. ; La sup'
tro varmis, kaj la homo ;
ekblovis sur la pladon.

'4 "Ej! kial tio, homamiko?"
— ; la faŭn' demande miris. ;
"Nu, kial? Do por
malvarmigo." ; Sed nun la
faŭno diris:

'5 "Amikoj esti ni ne povas, ;
mi perdis al vi fidon, ; kiu el
sama buŝo blovas ; la varmon
kaj la fridon."

& En sonĝo:

< Rekante 15 el 29 batoj por strofo, entute 145 paŝoj dum 2 minutoj. Verkis Marie Hankel (1907; Sableroj, Leipzig 1911). Baladigis Martin Strid (2017) per feroaj melodio kaj rekantaĵo tradukita de Jalgrima balado.>

(#Melodio:

<1,6:29> (

/La Tiidodo TiiLaLa LaaMi;Mi LaLa Tido TiiLa;La dore mi faamimi miimi;mi reedodo miimimi miLa;

(#Rekantaĵe: dore mi redo La Fa;So La dore mimi fami mimimii; redodoo do Ti La a)

)×5)+

(&Strofoj:

'1 En sonĝo mi bone parolas ;
La lingvon sen ia eraro, ;
Dirante mi, kion deziras, ; Kaj
ĉiam sen help' de vortaro.

(×:; **Tondru danco tre ĉarme
; nun tretu fiere ĉiuj en la
ĉen' ; staras jen mastrino.**)

'2 Facile la vortoj alvenas, ; La
frazojn mi formas fluante, ;
Neniam pri "sia" mi penas, ;
Mi ĉiam komprenas
"aŭdante".

'3 Malbona la akuzativo ; En
sonĝo neniel ekzistas, ; Ho,
bela en sonĝo la vivo ; El pura
korĝojo konsistas.

'4 En sonĝo... ho ne, mi ne
dormas: ; Mi vidas la helan
matenon, ; Kaj tamen la
vortojn mi trovas, - ; Nun fine,
mi rompis katenon!

'5 Mi nun efektive parolas, ;
Kaj jen babiladas fluege, ;
Dirante mi, kion deziras, ; Mi
estras la lingvon ĝojege!

& Histrikaj pikoj:

< Ripete 21 sed rekante 13 el 29 batoj por strofo, entute 145 paŝoj dum 2 minutoj. Verkis Ŝtefo Urban (Nova Ezopo, La Laguna de Tenerife 1961). Baladigis Martin Strid (2017) per samaj melodio kaj rekantaĵo kiel por "Birda festo".>

(#Melodio:

<:29> (/((dodo domi so so; laso fami mi re)×2 rere remi remi fami reTi So; rere remi remi fami reTi do o)×5)+

(&Strofoj:

,&1:

'1 (Granda elokvento - ; nutro por la vento. ;)×

(×:; × **Gaje kantu, tondre dancu en la ĉen'** ;)

'2 Troa teoremo - ; bela rekviemo.

'3 Nur la Providenco ; sen la konkurencio.

,&2:

'4 Kontraŭ la milito - ; kuŝi en la lito.

'5 Certa sinfrakaso - ; ŝipo sen kompasoj.)

& Kien vi rajdas?:

< Rekante 15 el 29 batoj por strofo, entute 145 paŝoj dum 2 minutoj. Verkis Kálmán Kalocsay (Ezopa Saĝo, 1956). Baladigis Martin Strid (2015) per samaj melodio kaj rekantaĵo kiel por La plej granda kulpulo.>

(#Melodio:

<:29> (

/La dore mi mi mire fare mi do; do redo dodo doLa dodo doTi;

(#Rekantaĵe: La dore mi mi re falre mi; doTi reTi do Lado Ti Ti La a)

)×5)+

(&Strofoj:

'1 Ĉevalo sovaĝiĝis, kaj ĝin vane ; klopodis la rajdant' reteni mane,

(×:; **Venu mastrino en la2 ĉen' ; Prenu mian manon en firma ten'.**)

'2 genue: La frenezan li ne sciis ; plu bridu, ĝi kuregis. Iu kriis:

'3 "Kien vi rajdas kiel la tempesto?" ; "Ho, kien plaĉas al ĉi besto."

'4 Tia ĉevalo estas ampasio, ; aŭ profitam' aŭ ambicio,

'5 tiel kuregas kun la homanim' ; jen la deziro, jen la tim'.

& Kurioza kulto:

< Rekante 15 el 29 batoj por strofo, entute 145 paŝoj dum 2 minutoj. Verkis Kálmán Kalocsay (Ezopa Saĝo, 1956). Baladigis Martin Strid (2015) per melodio kaj rekantaĵo de Drako Longa, Norda Kantaro #4414 kaj disduigo de versoj (;).>

(#Melodio:

<:29> (/mi mire redo dodo; dodo dore mi; mi mire mire mimi; soso fami mi;

(#Rekantaĵe: redo re rere mire do rere re; rere mire doTi LaSo So LaTi do o)

)×5)+

(&Strofoj:

'1 Buston de Hermes havis ; foje metiist', ; al ĝi oferis, al ĝi ; preĝis kun persist',

(×: **Bruas danco en halo, dancu en ĉen'!** ; **Ĝojaj paŝas ni en esperanto-kunven'.**)

'2 sed restis nur malriĉa. ; Fine, en koler', ; li ĝin ekkaptis kaj fra;pegis al la ter'.
.....

'3 Kaj jen, el la rompita kapo, ; tra la tru', ; abunde ŝutis oron al ; li la statu'.

'4 La majstro ĝin kolektis, ; kaj tre miris li. ; "Ho Hermes, stranga bub' ; vi estas," — diris li

'5 "vi pagas per ignoro ; por respekta kult', ; kaj per trezoro rekom;pencas por insult'."

& Moviĝemo:

< Ripete 14 sed rekante 6 el 29 batoj por strofo, entute 145 paŝoj dum 2 minutoj. Norda Kantaro #3323. Verkis Karin Boye. El sveda tradukis Magda Carlsson (1954). Melodio laŭ sveda bando FJK.>

(#Melodio:

<:29> (

(mi /so3so soso lala lala mi i i;)×

mi so3so somi fami reTi do oo;miso la ami so fa mi i

)×5)+

(&Strofoj:

'1 (La /sata tag' ne estas de signif' ;)× Plej bona tago: tago de soif'.

(×:; **Dadi daj da daj daj daj**)

'2 (Ja celon havas la migrada prem' ;)× sed plej valoras la migrado mem.

'3 (Plej bona cel': ĉefajra paŭzohor')× kun panopeco, kaj - rapide for.

'4 (Kie oni dormis por nur unu foj' ;)× en dorm' profunda sonĝe kantas ĝoj'.

'5 (Ekir'! Ekir'! Tagiĝas por vetur' ;)× Senlime grandas nia aventur'.)

& Ne fariĝi, nur esti:

< Rekante 15 el 29 batoj por strofo, entute 145 paŝoj dum 2 minutoj. Verkis Cezar. Baladigis Martin Strid (2016) per melodio de Drako Longa kaj rekantaĵo de Davida balado.>

(#Melodio:

<:29> (

/mi mire redo doodo;do dodo dore mi; mi mimi mire miimi;mi soso fami mi;

(#Rekantaĵe: redo re rere mire do rere re; rere mire doTi LaSo So LaTi do)

)×5)+

(& Strofoj:

'1 /Fariĝi vi ne volas, ; vi volas esti nur. ; Sed kiel ajn vi rolas, ; de vi ne restos spur'.

(×: **Bruas danco en halo, dancu en ĉen'!** ; **Ĝojaj paŝas ni en esperanto-kunven'.**)

'2 Vi estas sen kuraĝo ; kaj vivas por la pomp'. ; Pro mank' de certa saĝo ; vi vivas nur de tromp'.

'3 Vi iras al kongresoj, ; por ke ni vidu vin. ; Sed viaj interesoj ; nur vente montras sin.

'4 Vi vivas por speguloj ; kaj vantas en la lum', ; fieras inter nuloj ; kaj eĉ sen palpebrum'.

'5 Vi montras vin kaj rolas, ; laŭ dir' nur pro plezur'. ; Fariĝi vi ne volas, ; vi volas esti nur.)

& Radioaparato:

< Ripete 21 sed rekante 13 el 29 batoj por strofo, entute 145 paŝoj dum 2 minutoj. Verkis Ŝtefo Urban (Nova Ezopo, La Laguna de Tenerife 1961). Baladigis Martin Strid (2017) per samaj melodio kaj rekantaĵo kiel por "Birda festo".>

(#Melodio:

<:29> (/((dodo domi so so; laso fami mi re)×2 rere remi remi fami reTi So; rere remi remi fami reTi do o)×5)+

(&Strofoj:

'1 (Ĉe la eltrovaĵo ; granda avantaĝo:)×

(×:; × **Gaje kantu, tondre dancu en la ĉen'** ;)

'2 Se parol' malplaĉas, ;
oratoro aĉas,

'3 meze de l' mitingo ; eblas la estingo,

'4 aŭ alternativo ; al muzik-motivo!

'5 (Homo, tre bedaŭre! ; tedas, tedas daŭre)

& Rifuzo de Ezopo submetiĝi al Lidia reĝo Krezo:

< Rekante 15 el 29 batoj por strofo, entute 145 paŝoj dum 2 minutoj. Verkis Kálmán Kalocsay (Ezopa Saĝo, 1956). Baladigis Martin Strid (2016) per melodio kaj rekantaĵo de feroa Leiva balado.>

(#Melodio:

<:29> (/mi mimi redo doLa dore mimi mi; mildo dore redo doLa dore mimi mi;

(#Rekantaĵe: redo do dore mi; mire dore mimi; mimi mimi; redo doLa do mi La a))×5)+ /(

(#Rekantaĵe:)×

)+

(&Strofoj:

'1 “/Senditoj, aŭdu, rekta estas la parol’! ; Du2 vojojn antaŭ si nun havas la popol’:

(×: **Paŝu firme sur plank’, ; ŝuojn trivu ankaŭ, ; regu dio, ; kie dancos ni sen mank’.**)

'2 La unu vojo komenciĝas per sufer’, ; finiĝas pace: Estas vojo de l’ liber’.

'3 L’ alia ŝajnas tre alloga ĉe l’ ekir’, ; sed ĝi finiĝas en amaro, kun suspir’:

'4 Ĝi estas vojo de sklaveco kaj servut’. ; Libera ja naskiĝis la Samosa gent’,

'5 libere volas vivi, kaj ne kiel brut’, ; do ĉiujn fortojn ĝi kolektos por defend’.”

& Sincere:

< Rekante 15 el 29 batoj por strofo, entute 145 paŝoj dum 2 minutoj. Verkis Kálmán Kalocsay (Ezopa Saĝo, 1956). Baladigis Martin Strid (2016) per melodio kaj rekantaĵo Toreshavenaj de Jalgrima balado.>

(#Melodio:

<1,6:29> (

(#Toreshavena: /so sodo rere sooso;so miso laso soso; milso laso soso sooso;so mire mifa soso; (#Rekantaĵe: sola so somi re do; re rere so somi so; soso somi re do o))

)×5)+

(&Strofoj:

'1 /Renkontis lupon vulpo ;
maljuna, malkuraĝa, ; pe2tegis
pri indulgo ; por sia kapo aĝa.

(×:; **Tondru danco tre ĉarme
; tretu fiere en ĉen' ; staras
jen mastrino.)**

'2 La lupo diris: “Bone, se ; vi
tri sincerajn diros, ; je l'
granda Pan mi ĵuras, ke ; mi
nun vin ne disŝiros.”

'3 (La vulpo, post ĉi ĵuro, ;
parolis en sekuro: ;)×

'4 “Unue, kial tien ĉi ; vi venis
malbeninde? ; Due, se jam
alvenis vi, ; kial ne venis
blinde?

'5 Kaj trie: Por ke mi vin plu ;
neniam vidi devu, ; tro longan
vian vivon tuj ; finante, fine
krevu!”

ĈĜĤĴŜŬ ĉĝĥĵŝŭ ŬŬü ÇĔĬĈçēice Ññ ÂÊÎÔÛ âêîôû

•
ABCDĎEFGHĴ KLMNOPQRSTP UVWXYZÆØÅÄÖ
abcdĎefghĵ klmnopqrstp uvwxyzæøåäö